
Esperantista
Vegetarano
2018/2

# ESTRARO DE TEVA – 2018

| | | |
|---|---|---|
| **PREZIDANTO** | S-ano Christopher FETTES, bloomfettes@eircom.net<br>Bloomville House, Geashill, Co. Offaly | Irlando |
| **VICPREZIDANTOJ** | S-ano Francesco MAURELLI, fran.mau@gmail.com | Germanio |
| | S-ano József NÉMETH, jozefo.nemeth@gmail.com<br>HU-8531 - IHÁSZ - Fő u. 41/5 | Hungario |
| **ĜENERALA SEKRETARIO kaj KASISTO** | S-anino Paola GIOMMONI<br>(*vidu malsupre ĉe la sekretariejo*) | Italio |

# LANDAJ REPREZENTANTOJ

| | | |
|---|---|---|
| **BELGIO** | S-anino Heidi GOES Assebroeklaan 2, BE-8310 BRUGGE<br>heidi.goes@gmail.com | België – Belgique |
| **BRAZILO** | S-ano Ivan Eidt COLLING, Cx. P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, BR-80011-970, Curitiba, PR.<br>iecolling@yahoo.com.br | Brasil |
| **ĈINIO** | S-ano Liang Ziming, Direktoro de Haiming-Instituto, No.902 in building A4, fenghuang-ling-lu<br>CN-530000 Nanning, Guangxi, 470201831@qq.com | 中华人民共和国 |
| **DANIO** | S-ano Ejnar R. HJORTH, Christiansgade 38, 2, DK-9000 AALBORG<br>ejnarhjorth@mac.com | Danmark |
| **FRANCIO** | S-ano Thomas LARGER, 2 rue du verger, FR-56 460 LIZIO, thomas.larger@orange.fr | France |
| **GERMANIO** | S-ano Hans-Peter BARTOS, Schillerstr. 9, DE-06114 HALLE<br>nachrichten@bartos.info | Deutschland |
| **HUNGARIO** | S-ano József NÉMETH (*vidu supre*) | Magyarország |
| **IRLANDO** | S-ano Christopher FETTES (*vidu supre*) | Eire - Ireland |
| **ISRAELO** | S-anino Luiza CAROL, POBox 1083, IL-2910902 KIRIAT-YAM<br>luizacarol1947@gmail.com | Israel |
| **ITALIO** | S-anino Lilia FABRETTO, Via Pietro Cartoni, 12/12, IT-00152 ROMA<br>centro.p@virgilio.it | Italia |
| **JAPANIO** | S-ano SAITO Yoshinori, Iizuka 2-2-10-507, Kawaguchi - - SAITAMA, 332-0023 JP.<br>vendredo@nifty.com | Nippon |
| **KAMERUNO** | S-anino Chamberline NGUEFACK ZEDONG, chamberline47@gmail.com | Republique du Cameroun |
| **NEDERLANDO** | S-ano Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL - 1946 AE BEVERWIJK<br>moerbeekr@gmail.com | Nederland |
| **POLLANDO** | Krzysztof ŚLIWIŃSKI, ul. Dunikowskiego 27/9, PL 20-425 Lublin, oriento@wp.pl | Polska |
| **RUMANIO** | S-anino Júlia SIGMOND, Str. Vlahuţă 7/6, RO-400310 CLUJ-NAPOCA<br>jjjusi@gmail.com | România |
| **SLOVAKIO** | S-ano Stano MARČEK, Zvolenská 15/21, SK-036 01 MARTIN<br>stano.marcek@gmail.com | Slovensko |
| **SVEDIO** | S-ano Jarl HAMMARBERG, Illergatan 1 SE-42671 VÄSTRA FRÖLUNDA<br>jarlo@tele2.se | Sverige |
| **SVISLANDO** | S-anino Elisabeth EISENEGGER, Saumackerstrasse 59, CH-8032 ZÜRICH<br>eeisenegger@bluewin.ch | Helvetia |

Ĝenerala Sekretariejo de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) ĉe: **Paola GIOMMONI, Via Ugo Foscolo 22 IT-52100 AREZZO, Italio**. Telefono: +39 0575 900840. E-poŝto: giommpax@alice.it aŭ teva@ivu.org. Nia retejo: www.vegetarismo.info. **Atentu: ekde la 1-a de januaro 2019 ĝis la eklaboro de la nova estraro kontaktu TEVA pere de la redakcia adreso!**

# *Esperantista Vegetarano* 2018/2

**Organo de TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO (TEVA)**
Kunlaboranta kun UEA, kaj Membro de IVU kaj EVU
Movado fondita en 1908 – unua Honora Prezidanto Lev N. Tolstoj

## *Enhavo*

*Karaj legantoj* (József NÉMETH) ..........1
*TEVA-agado en Lisbono* (Heidi GOES) ..........1
*Junularo pli kaj pli vegetaras!* (Francesco MAURELLI) ..........3
*Finne vegetaru kun ni en 2019!* (Francesco MAURELLI) ..........3
*Du plurjaraj aliumo-specioj* (Heidi GOES) ..........4
*Rememoroj pri mia infanaĝo* (Marijan BENC) ..........5
*Vegetaranismo, sana vivteno sen kompromiso* (kun Tomáš PFEIFFER) ..........8
*Gravaj eventoj en Romo kaj en la ĉirkaŭaĵoj* (Filomena CANZANO) ..........11
*La vegetara leono* (pri la libro de Lode VAN DE VELDE) ..........14
*Teranoj* (Lenke SZÁSZ, Luiza CAROL) ..........15
Mallongaj informoj pri pagoj al TEVA ..........17
*Elekto de estraranoj de TEVA* (sinprezentoj, voĉdonilo) ..........18

**Kovrile**: Maturaj kratagoj / (*Crataegus sp*.). Foto de Jozefo NÉMETH.

***Limdato por sendi kontribuaĵojn por EV 2019/1: la 31-a de marto 2019.***

**Redaktis kaj kompostis:** József NÉMETH.
**Kunlaboris:** Luiza CAROL, Heidi GOES, Rob MOERBEEK, Russ WILLIAMS.
**Poŝta adreso ĉe:** József NÉMETH, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5, Hungario.
: jozefo.nemeth@gmail.com
Presita ĉe *Fork,* Slovakio. ISSN 2075-1346

# *Karaj legantoj,*

per tiu ĉi numero finiĝas pli ol 10-jara periodo en la vivo de TEVA. En la jaro 2007 Lilia Fabretto petis, ke mi helpu la redaktadon de nia organo. Ekde la jaro 2008 ni havis novan estraron, en kiu restis Christopher Fettes, sed aldoniĝis Heidi Goes, Francesco Maurelli kaj mi. En la jaro 2015 Heidi Goes devis rezigni pri sia funkcio, kaj anstataŭ ŝi Paola Giommoni pretis fari la sekretariajn taskojn tri jarojn longe. Komence de la jaro 2016 ankaŭ Christopher Fettes informis nin, ke li ne plu povas plenumi la prezidan funkcion. Tamen, li restis, almenaŭ simbole, ĉar neniu kandidatiĝis al tiu tasko. En 2018 evidentiĝis, ke TEVA estas en krizo (pro la malkreskantaj financaj ebloj reduktiĝis ankaŭ la paĝonombro de nia organo).

Ni provis reorganizi la estraron, sed tio ne sukcesis: eĉ la kunveno de TEVA en la portugala UK ne helpis. Do, ni aperigis alvokon por kandidatiĝi por la nova estraro. Ĝis la limdato venis tri kandidatiĝoj. Ilian sinprezenton kaj la voĉdonilon vi trovos sur paĝo 20. La estraro kaj la kandidatoj esperas, ke ĉiuj membroj voĉdonos. Voĉdoni rajtas nur membroj, kiuj pagis sian kotizon por la jaro 2018. Vi povas sendi vian voĉon papere aŭ per retmesaĝo al la adreso: *Christopher Fettes, bloomfettes@eircom.net. Bloomville House, Geashill, Co. Offaly, Irlando* ĝis plej laste la 31-a de decembro 2018.

La rezultoj de la elektoj estos diskonigitaj en januaro pere de la sociaj retoj kaj la listo *E-istajVegetaranoj* kaj poste en la nova numero de *Esperantista Vegetarano*. Se vi volas helpi al la laboro de la nova estraro, informu ilin!
Koran dankon pro la farita laboro al tiuj estraranoj, kiuj ne rekandidatiĝas. Kaj dankon al ĉiuj, kiuj helpis la laboron de la ĝisnuna estraro. Ni esperu, ke nia 110-jara vegetarana movado reviviĝos.

*József NÉMETH, redaktoro*

# TEVA-agado en Lisbono

*de Heidi GOES (Belgio)*

La lisbona UK estis mia unua partopreno en UK post kiam mi transdonis mian postenon al Paŭla Giommoni, en Lillo en 2015, kaj kvankam mi do ne plu estis estrarano, mi aktivis en la kutimaj agadoj de TEVA. Kiel vi povos

legi en ĉi tiu ne-oficiala raporto, pluraj aferoj rilate la UK-organizadon kaŭzis, ke tiu agado ne estis tre kontentiga.

Mi malfruis en la Movada Foiro, sed tuj kiam mi alvenis, mi transprenis la standon de Christopher Fettes. La tablo estis dividita inter kvar asocioj, kaj estis ege malmulte da spaco por meti ion ajn. Estis tre malgranda ejo, kun tre multe da homoj, kaj multaj ne eniris aŭ rapide eliris pro la tute maltaŭga loko. Mi tamen ricevis kelkajn eŭrojn donace pro la semoj kiujn mi kunportis por donaci. Mi forgesis meti la listojn de adresoj de restoracioj (sed fakte ne estis spaco por tio), kaj poste metis ilin ĉe la senpagaĵoj en la libroservo, kune kun la restantaj semoj.

Kiu jam partoprenis UK-on, scias ke estas du horaroj en ĝi, unu en tabela kaj unu en lista formo. Nu, ĉiu havas sian kutimon, kaj evidentiĝis ke (feliĉe!) Christopher kaj mi havas malsaman kutimon…. ĉar mi alvenis duonan horon post Christopher, pro malsamaj horoj en la du horaroj. Jam estis dekoj da aŭskultantoj kaj mi komprenis ke nia prezidanto estas klariganta pri tio ke ni bezonas novajn estraranojn, sed ke neniu sin proponis.

Mi demandis kion ili atendas de TEVA, de la kunveno ktp, ĉu ili estas membroj: ili plejparte ne estis membroj, kaj mi iom rakontis pri la historio de la asocio, kaj ankaŭ pri la neceso havi novajn estraranojn. La fakto ke ne-membroj tamen interesiĝas veni al niaj kunsidoj, devus feliĉigi nin, kaj ni devus preni tiun oportunon por, kiel diris unu el la ĉeestantoj, montri ion interesan pri plantbazita nutrado.

Venis pli poste Francesco Maurelli, kiu devis unue ĉeesti kunvenon kun la patronoj de TEJO pro la 80-jariĝo de TEJO, kaj rakontis pri EVU, IVU, kaj pri la UN-celaro 2030 pri daŭripova evoluo. Plant-bazita nutraĵo estas rekte ligebla al la plenumo de pluraj el tiuj celoj, kaj indas engaĝiĝi, kunlabore kun UEA kaj TEJO, sur internacia nivelo, por surtabligi la temon en la taŭgaj tavoloj de la socio kaj instancoj. Nur kelkaj ĉeestantoj ion diris, sed estis kelkaj ideoj: ekzemple estis peto ĉiam havi la liston de frazoj en la loka lingvo, por pli facile komuniki en la lokaj restoracioj, kaj havi ne nur liston de restoracioj, sed ankaŭ la menuoj en tiuj restoracioj estu en Esperanto... Necesus kontakti lokanojn por helpi pri tio, sufiĉe frue, kun kontrolado pri horaro kaj ferioj pli proksime al la kongreso. Post la kunsido aliĝis du personoj. Mi kunportis materialon al la Libroservo, kie vendiĝis kelkaj el niaj belaj TEVA-sakoj kaj -krajonoj.

Nek mi nek iu el la estraranoj aŭ membroj sukcesis organizi komunan manĝon. Fakte la varmego malhelpis eliri tagmeze por manĝi (mi mem apenaŭ manĝis tagmeze, kaj neniam ekstere), kaj vespere estis ĉiam iu programero, kio malhelpas longajn komunajn manĝojn. En la ekskursa tago mi mem devis laborkiale esplori en la nacia biblioteko, kaj ankaŭ tiu tago ne ĉiam taŭgas por ĉiuj. Tiu elekto de komuna taŭga momento ankaŭ en antaŭaj jaroj estis malfacila. Por la venonta UK nepre necesas ion aranĝi. Eble indus havi plurajn komunajn manĝojn, tiel ke ĉiu povu almenaŭ unu fojon iri. Pluraj restoracioj kie eblas manĝi vegetare, troviĝas en la centro, proksime al la kongresejo, do mi esperas ke tio funkcios!

# Junularo pli kaj pli vegetaras!

*de Francesco MAURELLI (Italio/Germanio)*

Tuj post la UK en Lisbono, la junularo kongresis en la apuda hispana Badajoz. Multaj trajtoj de IJK estas malsamaj al UK, tamen senteblis kelkaj komunaj trajtoj: la emo de aktivuloj konkrete antaŭenigi kaj pliprofesiigi nian movadon, kaj… la varmeco de la loko! Male al UK, kutime ne estas multaj kunsidoj de fakaj asocioj dum IJK, sekve TEVA ne havis formalan kunsidon. Tamen la ĉeesto de vegetaranaj kaj veganaj junuloj estas ĉiam pli alta en la kongresoj kaj eventoj tutmonde. Tio kio antaŭ kelkaj jaroj estis ioma *kuriozaĵo*, nun iĝas kutimo. La menuo de IJK estis atente pripensita por taŭge prizorgi diversajn dietpreferojn, tial vegetaranoj kaj veganoj povis gustumi variajn kaj gustoplenajn pladojn. Plej dankinda estas la ĉeforganizanto Carlos Pesquera Alonso, kiu aranĝis el Hamburgo tre sukcesan IJKn, ne nur laŭ la manĝa vidpunkto, sed ankaŭ laŭ la programo kaj la efiko en eksteraj amaskomunikiloj. Preskaŭ ĉiutage aperis artikoloj pri la kongreso en loka gazetaro, ĝis trafo de plej grava hispana ĵurnalo El Pais.

# Finne vegetaru kun ni en 2019!

*de Francesco MAURELLI (Italio/Germanio)*

La Universala Kongreso de Esperanto 2019 okazos en Lahti, en Finnlando. Fine de oktobro kaj komence de novembro okazis preparkunsido, kun partopreno de reprezentantoj de UEA kaj TEJO. La vicprezidanto de TEJO

kaj TEVA Francesco Maurelli partoprenis en la kunsido, kiu pritraktis interalie manĝeblecojn por la kongresanoj. Vegetaraj kaj veganaj opcioj estis sur la diskuta tablo ekde la komenco, kun la intenco provizi per kiom eble plej taŭga bonvenigo al ĉiuj kongresanoj. En Lahti estas tri tutvegetaraj restoracioj, kaj plejmulto el la aliaj restoracioj havas taŭgajn vegetarajn opciojn. Kunlabore kun la LKK, TEVA pretigos liston de manĝebloj por tiuj kiuj duoble verde kongresumos: ne nur Esperante, sed ankaŭ veg*ane. Eĉ tagmanĝo de la kunsido okazis en tre bongusta vegetara solidara kafejo!
Venu ekkoni Finnlandon kaj Lahtion, kaj estu certa ke atendos vin bongustaĵoj kiuj tentos vin eĉ dum la kongresaj laboroj!

# Du plurjaraj aliumo-specioj

*de Heidi GOES (Belgio)*



En multaj legomĝardenoj kreskas poreo kaj cep(et)oj. Jen du alternativaj specioj, kiuj travivas la vintron kaj pli- kaj pli multiĝas en la daŭro de la tempo: 'eterna poreo' (*Allium ampeloprasum*) kaj 'egipta cepo' aŭ 'arbo-cepo' (*Allium cepa var. viviparum*). [*vd maldekstre*]

La poreo estas (certe en la unuaj jaroj) pli maldika ol la kutima, unujara varianto, sed ĝi multiĝas pere de bulbetoj, kaj travivas la vintron. Dume vi povas rikolti la verdajn partojn. Se vi sukcesas bone planti la novajn bulbetojn, vi havos pli kaj pli da poreoj, kiuj, se vi forigas la ekflorojn, ankaŭ plidikiĝas iom post iom. Tiel eblas kun iom da pacienco havi sufiĉe da daŭraj poreoj por ne plu devi semi la unujarajn. Tio estas mia celo!

Ŝajnas ke, se oni provas havi novajn plantojn pere de semoj (kaj do ne forprenas la florojn), la procezo longe daŭras. Tamen, ĉi-jare ni kolektos la semojn, do eble post kelkaj jaroj mi povos pri tio raporti…

Kiam en majo 2017 mi aĉetis du etajn bulbetojn de 'egipta cepo' mi fakte ne havis multajn esperojn. Sed jen, du somerojn poste, mi havas 7 plantojn. Kaj tiuj estas precipe idoj de nur unu el la du bulbetoj, ĉar la alian mi lasis iom tro longe en poto kaj pro tio ĝi restis pli malgranda ol la unua, kiun mi plantis pli frue en 'plena tero', kie ĝi havis multe da spaco. Mi povis manĝi el ĝiaj bulbetoj kaj de ĝiaj verdaj folioj. La strangega afero pri la cepo, eble jam komprenata de vi el ĝia latina nomo, estas ke anstataŭ florojn kaj semojn, ĝi havas bulbetojn supre de la planto. Tiuj povas aŭ fali kaj ekhavi radikojn kaj tiel 'promeni' tra la ĝardeno, aŭ ili povas kreski kaj ekhavi verdaĵojn tie supre, kaj fine ankaŭ mem havi bulbetojn en sia pinto. Aspektas iom strange sed ĝi estas fascina. Kaj, ĉar mi ankoraŭ neniam sukcesis havi printempajn cepetojn el semoj, ĉi tiuj multe pli taŭgas! Antaŭ ne-longe ankaŭ el la bulboj kiuj multiĝis en la tero mem, ekkreskis novaj plantoj, do mi povos meti ilin ĉiujn en sia loko kaj parte disdoni al amikoj. Estas bone havi kion ajn de la familio *Allium* inter la aliaj legomoj, kaj tiaj daŭre vivantaj por tio tre taŭgas.

# Rememoroj pri mia infanaĝo

*de Marijan Benc (Kroatio)*

Ĉi tiun rakonton mi komencos ekde mia infanaĝo, kiu estis tre feliĉa tempo post la dua mondmilito, pasigita en la plej bela regiono de mia kara patrolando Kroatio. Mi naskiĝis en Lepoglava en la regiono de la Kroata Postmontaro (Hrvatsko Zagorje) en la jaro 1945.

Tiu vivoparto restis en mia memoro kiel la plej feliĉa periodo, ĉar tiutempe oni vivis tre simple kaj modeste. Ekzistis nek tro grandaj riĉuloj, nek tro malriĉaj homoj. La modesta vivo respeguliĝis en la estimo de aliuloj kaj en la reciproka helpado. Ĉiuj vilaĝanaj familioj posedis proprajn plugkampojn, arbarojn, brutaron kaj kortojn. Ne mankis nutraĵoj dum la tuta jaro. En ĉiu familio nur unu aŭ du personoj laboris en nemultaj entreprenoj, kiel ŝton-minejo, brikejo, manufakturo kaj meblo-fabriko.

La vetero ĉiam estis belega. La jarsezonoj ŝanĝiĝis unu post la alia, preskaŭ ĉiam egalritme, kun maloftaj osciladoj, kiuj estis nek longdaŭraj, nek tre fortaj. Tre bone mi memoras la jaron 1957, en kiu la 1-an de majo neĝis. Tio okazis nur unufoje, kiam la arboj jam havis foliojn. Okazis grandaj

damaĝoj, ĉar multaj branĉoj rompiĝis, peziĝintaj pro la neĝo. Tamen, la malbona vetero daŭris nur unu tagon, post kio la neĝo degelis, la temperaturo plialtiĝis, kaj la vivo en la vilaĝo tute normaliĝis. Al ni, infanoj, la vintroj prezentis grandan ĝojon. Dum la vintraj ferioj ni ĉiam povis plezure skiadi kaj glitveturadi. La vintroj estis tre longaj kaj tre malvarmaj, kun multe da neĝo. La neĝo knaris sub la plandoj dum paŝado. Kiel belegaj estis tiuj vintraj tagoj! Dum tiaj tagoj ne estis multe da laboro, kaj ni povis kviete atendi la alvenon de la printempo. Okazadis gajaj karnavaloj, la vilaĝanoj amikumis kaj organizis dancvesperojn. Ne ekzistis televidiloj kaj aŭtomobiloj, sed nur bicikloj, kiuj estis tre raraj kaj valoraj posedaĵoj.

Kun la alproksimiĝo de la printempo ni estis jam lacaj pro nenifarado, malvarmego kaj neĝo-plena vintro. En niaj kortoj restis amaso da neĝo, kiun ni devis forigi per ŝoveliloj kaj ĉaretoj, transportante ĝin en la riveron, kiu fluis tuj apud nia domo. Kiam nia korto restis senneĝa, ĝi estis preta por kreskado de herboj, bonvenigataj de la sunradioj, kiuj estis multaj kaj sufiĉe fortaj. Tiaj vintroj sin sekvis dum preskaŭ 25 jaroj post la dua mondmilito.

La klimataj ŝanĝiĝoj statistike komenciĝis en la 1950-aj jaroj, sed komence ili estis ne tre rimarkeblaj kaj fortaj. Dum mia junaĝo ekzistis malmultaj aŭtomobiloj, aviadiloj, fabrikoj kaj aliaj poluantoj de la naturo. Ne ekzistis problemo pri la rubaĵoj, kaj ni vivis harmonie kun la naturo.

La infanaĝa tempo por mi aparte belis dum printempa sezono, precipe en aprilo kaj majo, kiam komencis disvastiĝi ĉarmaj odoroj de floroj, fruktarboj kaj plantoj. Speciale interesaj estis urtikoj, kiuj apud nia domo abunde kreskis. Ĉirkaŭ la 1-a de majo okazis plugado de niaj kampoj. Ne ekzistis traktoroj, sed en la regiono de la Kroata Postmontaro homoj posedis ĉevalojn kaj la necesan plug-ilaron. Sur la kampojn oni ĵetadis nur stalan sterkon, kaj la nutraĵo estis produktata sen mineralaj sterkoj, kiuj nuntempe uzatas amasege, kaj kiuj malpurigas niajn kampojn kaj subterajn akvofluojn.

Ni plantis terpomojn, maizon, fazeolojn, tritikon kaj ĉion alian, necesan por nia konsumado. La precipitaĵoj estis regulaj, kaj kreskado de plantoj estis stimulata de mildaj kaj varmaj sunradioj. Oni ne bezonis apartan protekton por la plantoj, ĉar ne ekzistis planto-malsanoj. Ĉio kreskis senĝene, kaj niajn taskojn ni plenumadis nur manlabore.

Someroj estis varmaj, sed multe pli agrablaj, kompare kun la nunaj. Falĉadon de herboj por nutrado de la brutaro ni efektivigis per manfalĉiloj. Tio estis malfacilega laboro, farata dum sunaj tagoj. La infanoj tiusezone havis feriojn kaj nudpiede promenis, ĝuante la ludadon. Sed ankaŭ la infanoj helpadis siajn gepatrojn en preskaŭ ĉiuj laboroj. Sinbanado en la rivero Bednja estis ofta amuzaĵo dum tiuj someraj tagoj. Ni ankaŭ ofte grimpis sur la monton Ivanšĉica, en kies arbaroj ni kolektadis brullignon. Temis pri sekaj branĉoj por niaj fornoj, sur kiuj ni kuiris ĉiutagajn manĝaĵojn. En la arbaroj apud nia domo kreskis tre bongustaj mirteloj, kiujn ni ofte kolektadis kaj manĝis. Post la fino de somero venis aŭtuno. Tiam rekomenciĝis lecionoj en la lernejo, sed la helpado al niaj gepatroj ne ĉesis, ĉar venis la tempo por rikolti ĉion antaŭ la vintro. La vinberrikoltado estis tre grava, ĉar ni ĉiuj posedis vinberejojn. Rikoltado de fungoj tiutempe estis tre kutima, ĉar pro la regulaj precipitaĵoj la kondiĉoj por ilia kreskado estis tre taŭgaj. En la arbaroj sur Ivanšĉica kreskis multaj kaŝtanarboj, kaj ni kolektadis iliajn fruktojn. La kaŝtanojn oni kuiradis kaj bakadis, kaj ĝuis ilian guston. Manĝante la kaŝtanojn ni ankaŭ trinkis nian bongustan vinon, produktitan el la aŭtoktonaj vinber-specioj. Temis pri specioj, kiujn oni ne devis protekti per ŝprucigo de diversaj kemiaĵoj.

En Lepoglava mi vivis proksimume 20 jarojn, kiujn mi konservas en neforviŝebla memoro. Kvindek jarojn poste mi kaj miaj fratoj revizitis nian vilaĝon. Ni tre surpriziĝis pro la multegaj ŝanĝoj. Preskaŭ ĉio estas asfaltita kaj multas novkonstruitaj domoj. Ekzistas kanalizacio. Tute nekredeble! Ni revizitis la arbarojn, en kiuj ni iam ludis kaj kolektadis sekajn branĉojn. Nun ĉiuflanke kuŝas tiaj branĉoj, kiujn neniu plu kolektas, ĉar en la domoj por hejtado oni uzas tergason. Ĉio aspektas kiel en urboj, kvankam Lepoglava estas vilaĝo, en kiu vivas malpli da loĝantoj ol antaŭ 60 jaroj. La akvo-nivelo en la rivereto, kiu troviĝis apud nia domo, nun estas tre malalta. Proksime estis la domo de miaj geonkloj, kiuj posedis akvo-muelejon, en kiu oni muelis grenon por la vilaĝanoj. La muelejo ne plu funkcias pro akvomanko. En la naskiĝvilaĝo de mia patrino antaŭe ĉiu familio posedis almenaŭ unu bovinon. Hodiaŭ bovinojn neniu posedas! Sed ĉiuj havas aŭtomobilojn, kiuj malpurigas la naturon. Kvankam el Lepoglava al Varaždin, la administra centro de la regiono, oni povas veturi trajne kaj buse, malmultaj uzas tiujn trafikilojn. Ĉu la trajno al Varaždin estas profitiga entute? Mia frato diris, ke li posedas aŭtomobilon, por ke ĝi servu al li, kaj kiam mi admonis lin pri la poluado de la naturo, kiun

plejparte faras la aŭtomobiloj, li moke diris al mi: „Ĉu vi savos la mondon?”.

Ĉi tiun rakonton mi finas per la novaĵo, ke la nuna prezidento de Usono ne plu agnoskas la Parizan interkonsenton pri la klimataj ŝanĝoj. Kien do iras la mondo? Ĉu ankoraŭ restas la tempo por ŝanĝi nian konduton al la naturo?

*Aperis en Kresko 2018/4 (p.5-6.)*

# Vegetaranismo, sana vivteno sen kompromiso


Estimataj legantoj, de tempo al tempo ni prezentas al vi organizojn, grupojn kaj unuopulojn, kiuj per sia agado subtenas la ideon de vegetaranismo. La ĉefa penso por ekesto de tiu ĉi serio estis unue tio, ke vegetaranoj en Ĉeĥa respubliko, tiel pli frue, kiel nun, devas mem decidi, ke ili ne partoprenu la buĉadon de vivaj animaloj aŭ ili estis inspiritaj ĝuste de grupo aŭ de organizaĵo.

**„Kie estas informoj, tie estas ekscio, kie estas sciado, tie estas kompreno kaj toleremo”,** ni esperas, ke tiu ĉi serio utilos kaj pliriĉigos nin ĉiujn. Ni havas la honoron prezenti al vi pluan intervjuon kadre de tiu ĉi serio:

***En konversacio kun sinjoro Tomáš Pfeiffer***

## DUB – Spirita Universitato Bytí

(estado)




***VEGETARIAN.CZ****: Sinjoro Tomáš Pfeiffer gvidis al vegetaranismo dum tempo de sia funkciado grandan kvanton da homoj. Ni petis lin, ke li por niaj legantoj prezentu sian socion – Spiritan universitaton bytí (mallongige DUB), kiu eliras el la doktrino de sinjoro Zezulka.*

**Tomáš Pfeiffer**: Vi demandas pri mia laboro kaj mia socio, sed ĝi ne estas plene la mia. Ĉar homo ne povas fari aferojn sukcese, se li mem volus sekvi nur sian propran celon. Kiam tio ne estas

benita, kaj se vi al tio ne havas pli profundan rilaton, poste estas ĉiam same ĉio vana.

Do ni revenu al DUB. Mi venis al ĉio, kiel oni popole diras, iomete kiel blindulo al violono. Siatempe mi ekkonis sinjoron Zezulka, kaj tiam ĉio komenciĝis.

Mi estis serĉanto kiel iu ajn el la ceteraj homamasoj, kaj pro iu eksterordinara favoro, kiun ĝis nun mi ne tute komprenas, estis al mi ebligita tiun ĉi viron renkonti. Mi havis iujn travivaĵojn el juneco, sed nepre ne tiujn ambiciojn.

***VEGETARIAN.CZ**: Travivaĵojn el infanaĝo havas ni ĉiuj, ili devis esti pro io eksterordinaraj?*

**Tomáš Pfeiffer:** Jes, ili estis. Ĉirkaŭ la sesa jaraĝo mi havis iun intuicion, kiu aspektis tre neordinare. Ĝi interrilatis kun vegetaranismo. La kaŭzo, kial mi estas vegetarano, estas do ĝuste tio, ke mi havis kiel sesjara du treege fortajn spiritajn travivaĵojn, kaj pli poste multe da pluaj.

***VEGETARIAN.CZ**: Ĉu vi povas al ni ilin proksimigi?*

**Tomáš Pfeiffer:** En tiu unua mi subite troviĝis en ĉambro, kiu estis por mi tre neordinara pro tio, ke ĝi ne estis stukita, ĝi estis el grandaj, precize prilaboritaj ŝtonoj. Estis tie tablo. Denove specifeco – ĝi havis ŝtonan platon kaj estis relative granda. Kaj kun mi estis du akompanantoj – viro kaj virino. Kaj en tiu travivaĵo surprizis min ankaŭ iliaj vestoj, ĉar ili estis vestitaj en ege longaj roboj. Estis ili belaspektaj homoj.

Kaj sur la tablo, sur la ŝtona plato estis ega amaso da diversspecaj fruktoj. Supre kiel krono, juvelo, estis ananaso kaj ili al mi diris: „Sidiĝu kaj manĝu." Do, mi sidiĝis al tiu tablo. Estis tie telero. Eble eĉ, mi pensas, ke ĝi estis ora. Kaj sur tiu telero estis tri ripviandoj, kaj mi estis ege malsata, do mi ekmanĝis kaj ili al mi bongustis. Antaŭ ol mi finmanĝis, tion mi memorfiksis absolute perfekte, la virino diris al mi: „Stariĝu kaj iru."

Mi estis eĉ kolerema, ĉar mi malsatis kaj ŝi prenis min for de tiu ĉi manĝo. Malgraŭ tio, eĉ kontraŭ mia volo, mi devis ekstari. Ni trairis pordon, sed denove tio ne estis plene kutima pordo. Estis ĝi nur ŝtona pordokadro kun timpano. Ni trairis en komplete similan ĉambron – denove ĉio el ŝtono. Eĉ la tablo estis simila kaj sur ĝi estis io kovrita per granda blanka ŝtofo. La

virino alpaŝis al la ŝtofo, levis ĝian angulon, montris al mi, kio estas sub tiu ĉi ŝtofo kaj diris: „Do, ĉu tio bongustis al vi?“”Tre korafable.


Sur tiu tablo kuŝis mia patro kaj al li mankis tiuj tri ripoj. En la momento de tiu ĉi vizio mi ekkomprenis, ke tio, kion mi manĝis, estis kadavro. Ĉar ĝis tiu momento mi ne konsciiĝis, ke viando estas fakte kadavro.

Simple viando estis viando kaj kadavro estis kadavro. Mi ne kunligis tiujn aferojn kiel plej multo da homoj. Nu kaj plie tio estis kadavro por mi tre konata. Mia patro. En tiu momento subite, mi ekkomprenis, ke mi satiĝis per mortinto, per kadavro literprecize – tio estas plej bona esprimo, kaj ankoraŭ per tiu de mia patro. Kaj tio estis la fino de tiu vizio, kiun mi memorfiksis tiom profunde. Poste, mi pensas, mi relative longe rifuzadis viandon. Maksimume tri, kvar semajnojn daŭris, ĝis la familio „venkis” super mi. Ĉar ili diris, kompreneble: „Vi estos malforta, vi estos…” Alie tio ne estis ebla.

***VEGETARIAN.CZ**: Ĉu vi klarigis tion al neniu?*

**Tomáš Pfeiffer**: Pri tiu ĉi travivaĵo mi diris al neniu. Al neniu. Mi ne scias kial. Simple en tiu momento mi sentis, ke mi ne estus komprenita. Mi ne scias ekzakte la kialon. Verŝajne estis simple malfacile por sesjara infano kompreni. En tiu tempo mi havis ankoraŭ unu fortan travivaĵon, kiu poste ankaŭ tre helpis al mi. En ĝi mi iris tra kampo, sur kiu estis mallongaj spikoj, kaj kvazaŭ surhorizonte subite aperis seĝo kun alta apogilo, kaj sur la seĝo sidis viro. Li estis relative juna, mallonghara. Mi venis al tiu viro kaj subite mi eksentis ion, kion mi ĝis tiu momento neniam spertis. Mia brusto ege malfermiĝis, mi sentis varmon.

Subite mi kvazaŭ ne kapablis iri al li, tiom granda forto el li brilis. Kaj kiam mi proksimiĝis, tiam mi ne povis eĉ rigardi lin. Mi devis mallevi la kapon kaj iri kun mallevita kapo. Tio estis tiom forta, kvazaŭ mi rigardus al la Suno. Do mi venis al li, mi genuiĝis antaŭ li, la kapon daŭre klinita, kaj li komencis kun mi paroli. Sed li ne parolis per vortoj.



Kaj tio estis neordinara travivaĵo, ĉar en tiu tempo, en mia sesjareco, apenaŭ oni sciis pri telepatio aŭ pri aliaj aferoj, pri mentala komunikado. Kaj li konversaciis kun mi. Do tio estis la dua tre forta travivaĵo.

(*daŭrigo venonte)*

# Gravaj eventoj en Romo kaj en la ĉirkaŭaĵoj

**1. En Romo**

„Ri-Evolution Rome Fruit Fest"

***Harmonia Re-Evoluo – fruktfesto en Romo***



„Festa Raduno dell'Amicizia, Coordinazione e Cooperazione!"

***Festa Kunveno de Amikeco, Kunordigo kaj Kunlaboro!***

**La 27an de majo**, en la parko de la *Caffarella* en Romo, estis nacia itala evento – sed bonvenaj estis ankaŭ eksterlandanoj – dediĉita al la *Ri-Evoluzione Armonica* t.e. „Harmonia Re-Evoluo", kaj al ĉiuj tiuj amikoj kiuj deziras partopreni en agado de la tipo **kreski kune, helpante sin reciproke**, en plaĉa etoso esti kune, ekkoni unu la alian; interparoli pri naturo, fruktoj, vegetaranismo, fruktomanĝantoj, ekovilaĝoj, bonfarto; ludi, plenumi muzikaĵon, danci sed ĉefe manĝi kune la sezonajn fruktojn, kiujn la partoprenantoj kunportis al la festo, en paco kaj en harmonio, kun la devizo **pli realaj kaj malpli virtualaj.**

La festo estas ĉiam senpaga kaj malfermita al ĉiuj tra la ideo en la angla esprimo „open source", t.e. ĉiu portas ion, fruktojn aŭ spertojn aŭ fakojn kaj ĉefe gajecon kaj bonan humoron.

Do kion necesas alporti kaj kion NE alporti en tiu festo?

<u>Alportu</u>: freŝajn, sekigitajn, senakvigitajn fruktojn; tolaĵon por kuŝi tere; deziron farti bone kaj amuziĝi kaj amuzi; deziron koni kaj kompari ideojn inter si.

<u>Ne alportu</u>: dogmojn kaj absolutismojn, absolutajn verojn, antaŭjuĝojn, polemikojn kaj sterilajn kritikismojn.




*Se vi deziras helpi aliajn, komencu plibonigi vin mem.
Estu mem la ŝanĝiĝo, kiun vi volus vidi en la mondo!*

*Se vi pliboniĝos, vi proponos konstruan ekzemplon. Kaj vi konstruas ponton al feliĉo,*

*Bonfarto kaj sano kun bona sento kaj simpleco*

Mi jam partoprenis, dum kelkaj pasintaj jaroj, en tiu Festo kaj ĉiam mi ĝuis la plaĉan kaj pacan etoson; ankaŭ dum tiu ĉi jaro mi fartis tre bone kaj mi amuziĝis.

La ne rigida programo de tiu ĉi jaro, inter mateno kaj posttagmezo, enhavis, interalie:

- revigliĝon kaj meditadon, Emy-Luca (Bio Movo)
- jogon de ridado, Emy d'Erasmo –Wladimir Lembo
- gravecon de frukta nutrado (Asso Fruit)
- vegetalan kosmetikaĵon
- projekton Ubuntu; holisma „*itale Olistica*" kunlaboro kaj kunhelpo
- bonvenu al Tera Ebeno (geofizikaj kaj spiritaj enprofundiĝoj pri la loko kie ni vivas)
- individua suvereneco: reakiri la plenan posedon de la propra valoro; liberaj kunpartigoj kaj proponoj de solvoj
- „mi donacas brakumojn"

Se vi deziras partopreni la venontajn jarojn: bonvenon! ☺
Kutime la festo okazas la lastan dimanĉon de majo.



Luca Speranza estas la ĉefa organizanto de la Fruktfesto kaj kunlaboranto de la Festivalo de la Herboj. Interalie, li estas esploristo kaj fakulo de la natura vivo kaj de la holisma bonfarto; elpensinto de la „Bio Movimento Ri-Evolutivo" t.e. Bio-Movo Re-Evoluo, kaj elpensinto kaj kunfondinto de la projekto Ubuntu; administras la

retejojn www.innerclean.it kaj www.ehretismo.com; puŝas al adopto de arbo kaj ankaŭ de legomĝardeno; sugestas kiel pretigi naturan vegetalan kontraŭparazitaĵon ktp.

**2. En la ĉirkaŭaĵoj**

La 2-an kaj la 3-an de junio en Contigliano (pr. Kontigliano), Rieti, en la itala centro, proksimume 1 horon, iomete pli, aŭtomobile el Romo, estis la **Festivalo de la Herboj**, danke al Michele Meomartino kaj al liaj kunlaborantoj. La festivalo estas malfermita al ĉiuj kaj enhavis seminariojn, renkontiĝojn kaj pliprofundiĝojn.

En Contigliano estas ankaŭ la sidejo de la **projekto Ubuntu**.

La nomo Ubuntu devenas el la dialekto nguni-bantu t.e. „homaraneco al aliaj”. Rilatas al sudafrika filozofio kiu aŭspicias universalan ligon de interŝanĝo kiu unuigas la tutan homaron. La celo de „Ubuntu” estas porti tiun ideon en la mondon de la softvaro, per ĉi tiuj reguloj:
- ĉiu uzanto (utiliganto) havu la eblon realigi, studi, modifi, personigi kaj distribui propran operacian sistemon sen pagi koston de licenco;
- ĉiu uzanto povu uzi propran operacian sistemon en sia propra lingvo;
- la uzanto, eĉ handikapita, kapablu operacii per propra komputilo.

**La festivalo**, post la unua sperto en la regiono Abruco antaŭ 5 jaroj, estis organizita en malsamaj italaj regionoj, dum 40 etapoj. La rezultoj estis ĉiam pozitivaj kaj multegaj partoprenantoj alvenis de pluraj regionoj. Dum malmultaj jaroj, tiu **migranta Festivalo**, naskita de la pasio kaj de la amo por la Patrina Tero iĝis unu de la plej gravaj herbo-kultaraj ekspozicioj de Italio.

Do la Festivalo estas ĉiam dediĉita al la rava mondo de la herboj kaj kolektas la sperton de pluraj jaroj da sindevigo en la disvastigo de bonaj praktikadoj, ankaŭ en media kaj botanika kampoj.

Herboj, floroj, plantoj, arboj ktp. estu integriĝintaj en alia vido, tutece kaj integriĝinte en nia vivo, kiu estas bedaŭrinde ofte malproksima de la „natura mondo”

Dun la tuta daŭro de la Festivalo ĉiam estas bazaroj kun ekspozicio de produktoj de la herba sektoro, de la biologia/biodinamika agrikulturo, gustumado de vinaj kaj gastronomiaj produktoj biologiaj kaj lokaj tipoj, natura kuirarto, spertiĝaj laboratorioj, artaj momentoj, debatseminarioj,

konferencoj, ludotekoj por infanoj, promenadoj kaj multaj festenaj plezuroj partopreni kune.

Dum tiu ĉi jaro, estis interalie:
- *herbista vojo*: rikolto, identigo kaj katalogado de la spontanaj herboj rikoltitaj dum promenado; ludoteko de floroj; vegetala kosmetiko, do „fruktmetika”; natura kosmetika: plantoj kaj mineraloj ligitaj al la suno kaj al la luno kaj siaj plantoterapiaj kaj energidonaj utiloj; herboj, fruktoj, legomoj en kuirarto: saŭcoj, kremoj, krudaj saŭcetoj;
- *prelegoj kaj konferencoj*: plantoj por la bonfarto de la psiko; ekskursemo inter naturo, kulturo kaj spiritualeco; amantoj de fruktoj en Italio; „estis iam pano”; malmola tritiko Senatore Cappelli: tritiko akirita dank’ al la genetikisto Nazareno Strampelli; de tritiko al pano: natura panfarado per antikvaj grenoj kaj patrina gisto; daŭripovo.
- *estis ankaŭ*: seanco de jogo kaj de ridada jogo; interŝanĝa spaco: ŝanĝo de semoj; zono de holista bonfarto: masaĝoj kaj individua konsultado; vegana kaj vegetarana nutroaktivado.

# La vegetara leono

„La vegetara leono” estas facila, ilustrita rakonto por infanoj en larĝformata libro. *Resumo de la rakonto*: Eta leono ĵus ĉeestis kruelan ĉasadon kaj decidis ke ĝi ne plu volas manĝi viandon, malgraŭ la insisto de la gepatroj. Ĉe la rivero, la eta leono renkontas junajn bubalon, zebron kaj gazelon kaj li provas manĝi kiel ili. Ĉu li sukcesos adaptiĝi al la manĝado de plantoj, vi legos en la libro!

Post la rakonto venas mallonga raporto pri vere ekzistinta vegetara leono. Fine, la libro enhavas ankaŭ 20 paĝojn kun receptoj, allogaj por fari kune kun infanoj.

Aŭtoro: *Lode Van de Velde. Paĝoj: 48. Formato: 22,86 cm x 17,78 cm. Prezo: 9 eŭroj (4,25 eŭroj por la bitlibro en formo PDF). Mendi: www.eldonejolibera.be. Se vi deziras pliajn informojn, simple kontaktu la aŭtoron: lodchjo@yahoo.com.*

# TERANOJ



*Vortoj: Lenke SZÁSZ*
*Melodio: Luiza CAROL*

*Sur glata vojo glitas silente nokta buso,*
*Mi sidas duondorma kaj laca en mallumo.*
*Vojrande herboj, arboj kliniĝas pro la vento;*
*En mian kapon venas subite stranga penso.*

*Mi pensas, ke la arboj kaj herboj eble sentas*
*Same kiel la homoj, teranoj ili estas,*
*Kun ili ni dividas nian surteran vivon,*
*Kaj sentas ankaŭ ili solecon kaj la timon.*

*Ĉu sentas vi, ho arboj, konscias pri la morto,*
*Pri kio nin atendas, nia komuna sorto?*
*La vento sub la pala luno vin klinadas,*
*Velkintaj, senfoliaj, senvorte vi staradas.*

*Iras la nokta buso, dormas la pasaĝeroj –*
*Spirito de la kosmo ŝvebas super la tero.*
*"Ne timu kaj ne plendu, ne estas vi solulo,*
*Vi estas, kiel arbo, parteto de l' Naturo."*

*El la libro "Kantoj por geamikoj" kun bildaranĝoj de Liette Lêla, elshutebla ĉe [http://verkoj.com/verkistoj/luiza-carol/](http://verkoj.com/verkistoj/luiza-carol/)*

# TERANOJ

Vortoj: Lenke SZÁSZ

Melodio: Luiza CAROL






# Mallongaj informoj pri pagoj al TEVA:

*Kiom?*

La kutima kotizo estas 20 eŭroj, sed homoj kiuj ne povas tion pagi, povas pagi 15, 10 aŭ 5 eŭrojn. Homoj kiuj tute ne povas pagi, sciigu tion, aŭ ne plu estos konsiderataj membroj. Dumviva membreco estas rekomendata kaj kostas 500 eŭrojn.

*Kiam?*

Plej facilas pagi fine de la jaro por la venonta kalendara jaro. Sed plej malfrue pagu en februaro de la koncerna jaro.

*Kiel?*

Oni povas pagi al la konto de TEVA ĉe UEA: teva-h. Klarigoj pri tio kiel pagi al UEA aperas en *http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html* kaj en la Jarlibro. Kelkaj Landaj Reprezentantoj havas propran konton. Vi povas informiĝi pri ĝi ĉe via Landa Reprezentanto aŭ la Sekretario. Eblas sendi TEVA-kotizon ankaŭ per PayPal, informojn petu de nia Sekretario. Kiel ajn oni pagas, oni informu pri la pago kaj membriĝo al la Landa Reprezentanto kaj al la TEVA-Sekretario, sciigante siajn nomon kaj adreson.

# Elekto de estraranoj de TEVA

**Kandidatoj**

*Heidi GOES (LR en Belgio)*

*D-ro LIANG Ziming (LR en Ĉinio)*

*NÉMETH József (LR en Hungario)*

**Sinprezento de Heidi GOES (Belgio)**



Vegetarano de 1991 kaj vegano de 2008, mi estis sekretario de TEVA de 2008 ĝis 2015. Tiam mi devis transdoni mian postenon kaj laboron pro tio ke mi ne povis ĝin kombini kun mia doktoriĝo. La plano estas ke mi defendos mian disertacion en la printempo de 2019, do post ĝi mi ree havos iom pli da tempo. Mi ŝatus labori por havi refoje pli da membroj, aktivigi la membrojn kaj aktivi pli kaj pli dum Esperanto-aranĝoj, sed ankaŭ dum aranĝoj de vegetaranoj kaj veganoj. Necesos pluraj agemaj kaj kunlaboremaj estraranoj por tio, sed ankaŭ membroj kiuj povas foje helpi pri tio aŭ alio. Mi esperas ke la nova estraro, kia ajn estas ĝia konsisto, sukcesos veki kaj aktivigi nian endormiĝintan asocion.

**Sinprezento de D-ro LIANG Ziming (Ĉinio)**
Mi nun, kiel direktoro, laboras en Haiming Instituto Kultura pri Sano k Harmonio, Nanning, Ĉinio.



Mi esperantistiĝis en 1978/1979, estis membro de UEA, delegito en Ĉinio en 1981-1990, prezidanto de Esperanto-Asocio en Guangxi Provinco, membro de la konsilantaro de Ĉina Esperanto-Ligo en 1985-1991, vicestro de la ĉina sekcio de ILEI en 1989-1991, ĉina Reprezentanto de TEVA ekde oktobro 2016.
Mi estis docento (1985-1990), profesoro (1990-1996) pri lingvistiko, estis direktoro pri la Esperanta sekcio de la Guangxi-a Universitato por nacioj (1986-1996), direktoro de oficejo pri eksterlandaj aferoj de la universitato (1989-1992).
Mi organizis la unuan ĉinan landan kongreson en 1986 kaj la unuan azian konferencon pri Esperanta Instruado en 1989 ĉe nia universitato. Mi estis ankaŭ komisionano de la internacia ekzameno de Esperanto, kiu estis unuafoje ekster Eŭropo en la historio de Esperanto.
Mi gvidis E-kursojn per Cseh-metodo en kelkaj landoj, krome komercis, ankaŭ administris Instituton pri Orienta kulturo en Pollando 1990-2000.

IOM PRI MIAJ PLANOJ
1. Subtenado al TEVA-laboro, ĉefe per varbado de novaj membroj en Ĉinio, iuj aziaj landoj, sed ankaŭ en Eŭropo kaj Ameriko.
2. Subtenado per iom da financa helpo.
3. Propono pri tasko de varbado de novaj membroj helpe de la Landaj Reprezentantoj.
4. Propono pri premiado al kontribuantaj membroj en la renkontiĝoj dum UK-oj.
5. Propono pri kunlaborado kun Monda Aktiva Televido, Supreme Master Chinghai, por kuna propagandado pri vegetaraĵoj, media protektado ktp.

**Sinprezento de NÉMETH József (Hungario)**



Mi diplomiĝis kiel bibliotekisto kaj bazlerneja instruisto pri matematiko en 1983. Ekde 1985 laboras en bazlernejo instruante 10-14-jarajn infanojn. Esperanton mi eklernis en 1979. En 1994 mi estis diplomita kiel Esperanto-instruisto en la pedagogia altlernejo de Szombathely. En 2000 diplomiĝis pri informadiko en la Universitato de Veszprém. En 2006 en la sama universitato ricevis diplomon kiel fakpedagogo pri pedagogiaj mezurado kaj taksado. Nun laboras kiel instruisto pri matematiko kaj informadiko en bazlernejo. Ekde la aŭtuno 1994 mi estas la redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* de ILEI kaj ekde 1996 la estro de ILEI-sekcio en Hungario. Krom la redaktado de IPR mi prizorgas ankaŭ la hejmpaĝojn de ILEI, IPR kaj ILEI-HU. En 1999 mi transprenis la redaktadon de *Naturista Vivo* (la organo de INOE). En 2001 mi iĝis Landa Reprezentanto de TEVA kaj en 2008 ĝia vicprezidanto. La revuon *Esperantista Vegetarano* mi redaktas ekde 2007. Mi ne estas kongresema esperantisto, do, la kunvenojn kutime mi ne partoprenas, sed mi daŭre pretas helpi al TEVA, se temas pri la revuo aŭ pri taskoj solveblaj per miaj informadikaj aŭ organizaj spertoj.

## Voĉdonilo

Mi voĉdonas por:

1) Heidi GOES (Belgio): jes / ne / sindeteno
2) D-ro LIANG Ziming (Ĉinio): jes / ne / sindeteno
3) NÉMETH József (Hungario): jes / ne / sindeteno

Nomo:…………………… Subskribo:………………………

Noto: la membroj de TEVA rajtas voĉdoni por 1-2 aŭ 3 kandidatoj per substreko de la taŭga vorto. Ili povas sendi sian voĉon papere aŭ per retmesaĝo al la adreso: *Christopher FETTES, bloomfettes@eircom.net. Bloomville House, Geashill, Co. Offaly, Irlando* ĝis plej laste la 31-a de decembro 2018.